EKO 2021
Esperigaj Komunikoj

Je via servo tra ok jaroj, depost 2013

2020: rekorda jaro: kun 60 komunikoj

Subtene al la loka, landa, faka kaj regiona agado

EKO 2021-05 sendita el Budapeŝto la 5an de februaro. Kontrolo el Benino.

Al: Komitato, sekcioj kaj aktivuloj de ILEI, Landaj kaj Fakaj Asocioj de UEA (aliĝintaj kaj ne). Plie al la Komitato, Konsilianoj, regionaj komisionoj de UEA, TEJO-estraro, gazetaro, partoprenintoj en iuj AMO-seminarioj, aliaj listoj kaj unuopuloj. Pli ol 1500 ricevantoj. Kun plusendoj pli ol 2000.

Por tuja uzo kaj plia diskonigo inkluzive de la alkroĉaĵoj kun indiko de fonto: EKO de ILEI kaj UEA

Tago de la gepatraj lingvoj

Unuiĝintaj Nacioj festas tiun tagon ĉiujare. Ĝi okazos en la 21a de februaro. Esperantistoj jam multe eluzas la eblon. Restas semajnoj por pretigi tion: UEA pretigis okulfrapan afiŝon. Jen kelkaj sugestoj:

- Vidigi la afiŝon en viaj retejoj.
- Organizi publikajn kunsidojn kun la temo.
- Kunlabori kun la Asocio de Unuiĝintaj Nacioj en via lando, se ekzistas.
- Kunlabori kaj aktivulaj grupoj defendante lingvajn rajtojn por negrandaj lingvoj.

La Tago ebligas al ni emfazi nian apogon por minoritataj kaj minacataj lingvoj, kaj eble gajni aliancojn en la streboj por lingva kaj komunika justeco. Ni diru al la neesperantista mondo, ke ni havas ion por diri defende al la homaj lingvaj rajtoj.

Vi trovos la afiŝon por la ĉi-jara tago, 2021 02 21. Ni atendu ankaŭ la tekston, kiun UEA transdonos al UN por konigi ĝin al neesperantistoj en niaj landoj. Intertempe bonvolu sendi al renato@esperanto.org la tradukon al via nacia lingvo de la slogano **"Per la uzo de la internacia lingvo Esperanto oni respektas la lingvan kaj kulturan diversecon de ĉiu homo".**

Rigardu aŭ elŝutu la afiŝojn ĉe

https://i.getspace.eu/cloud/index.php/s/MPETo3GExBZNgyF?path=%2FGepatra-Lingvo

La afiŝo estas je dispono ankaŭ en la angla, finna, franca, germana, hispana, hungara, itala, nederlanda, rusa, slovaka, sveda kaj la turka, kun la daŭra aldono de pliaj lingvoj. Kiel kutime, la artisto estas Peter Oliver kaj la teksto kaj koncepto de Renato Corsetti. La preparado kostis multan penon; ni eluzu la rezulton!

Impeto ĵus aperigis gravan libron

Temas pri 'Antologia skizo de la persa literaturo' de Said Balucî. Jen la unua fojo, ke la persa literaturo aperas en tiu seio. Laŭ atentigo de Giridhar RAO en sia antaŭparolo, "jam en 2004 Abel Montagut sciigis nin pri la neegaleco en la monda kultura trafiko de tradukado. Inter la tradukaĵoj listigitaj en la *Index Translationum* de Unesko, la fontlingvoj por 70% el ili estis nur kvar lingvoj: la angla, rusa, franca kaj germana.

Ene estas tradukoj kaj klarigoj de prozspecimenoj de 33 aŭtoroj aŭ libroj (102) kaj poemspecimenoj de 24 poetoj. Ĝi aperis en la renoma Serio Oriento-Okcidento de UEA, n-ro 58. Plie ĝi aperis sub Aŭspicioj de UEA en Konsulta Partnereco kun Unesko. Provlegis Rob Moerbeek; Respondecaj redaktoroj Dmitrij Ŝevĉenko, Anna Striganova, Moskvo, Impeto, 2021. — 164 p. Tiu ĉi libro aperis ne nur paperforme, sed ankaŭ bitforme. Ĝin eblas senpage elŝuti en la retejo de eldonejo 'Impeto' ĉi-tie:



http://persa.trovu.com/

Video, kiu prezentas la libron:

https://www.youtube.com/watch?v=TCpl2iHFtLU

Por subteni nin bv. 'ŝati' la videon kaj aboni nian kanalon.

La libro baldaŭ akireblos de la Libroservo de UEA kaj de aliaj libroservoj. Vidu ĉe 'Laste aperis': uea.org/via/retlistoj?listo=ls. La prezo kredeble estos ĉ. € 15, sed atendu sciigojn! Por rusoj kaj apudlandanoj povos pli konveni mendi ĝin rekte de la eldonejo en rubloj: 'Impeto'. impeto@impeto.ru.

La serio Oriento-Okcidento estas la plej longedaŭra el ĉiuj kontribuoj de UEA al projektoj de Unesko, inaŭgurita en 1961. Ĝi kontribuas al la Unesko-Programo por Reciproka Studo kaj Aprezado de Kulturoj de Oriento kaj Okcidento. Pri la akcepto de novaj titoloj en la serion decidas la Estraro de UEA, sed en la eldonado povas parto-preni eldonistoj plenumantaj la kvalitajn kaj teknikajn postulojn de la serio.

Pluraj titoloj de la serio Oriento-Okcidento estas aĉeteblaj ĉe katalogo.uea.org. La tuta listo aperas ĉe Vikipedio, kunlabore kun UEA: eo.wikipedia.org/wiki/Serio_Oriento-Okcidento.

Per tiu projekto, la serio fariĝas pli Oriento kaj malpli emfaze Okcidento.

Nova revuo por Eŭropo, TEJO engaĝita

Grupo de amikoj en Francio kaj Hispanio ĵus kreis ĵurnalon pri regionoj en Eŭropa Unio, ties ekonomioj, lingvoj kaj kulturoj. Ili akceptas verkojn el diversaj regionaj lingvoj, inter ili Esperanto. Mi proponis al ili nomon en Esperanto, do ĝi nomiĝas *La Regionisto*, kaj estas jam oficiale regisitrita tiel. Se iu interesiĝas pri traduko aŭ (re)publikigo de artikolo, aŭ en Esperanto aŭ en alia lingvo, aŭ regiona aŭ nacia, bv. sendi mesaĝon al: laregionisto@outlook.com

Jen la paĝo en facebook: https://www.facebook.com/LAREGIONISTO/

kaj la retejo: https://laregionisto.com/

Temas pri eŭropa ĵurnalo kun nomo en Esperanto, kiu akceptas artikolojn en Esperanto pri regionoj en Eŭropo. Vidu:

https://eo.wikipedia.org/wiki/La_Regionisto

Mounir Abijou, TEJO.

Plupedale, puŝpotence kaj postaĵpreme niaj biciklistoj en BEMI persistas

>
Jen la freŝaj kontaktinformoj por BEMI, la biciklista fako de UEA kaj TEJO.

Retejo: https://bemi.tejo.org/

Diskutgrupo: http://bemi.groups.io/

Adreso: c/o Lars Sözüer, Realschulstr. 12, DE-47051 Duisburg, Germanujo

Retadreso: bemi-estraro@tejo.org
>

Lars Sözüer, Ĝenerala Sekretario de BEMI

Pliaj gutoj malgrandaj pri kursoj

La redaktoro de edukado.net informas vin, ke aldoniĝis du novaj eroj ĉe la Kursejo. Jen estas kelkaj informoj pri ili:

Nomo: Universidad Nacional de Educación a Distancia UNED
Gvidantonomo: Luis Eduardo Berdor Remón
Tipo: Nova universitata kurso (kredeble reta)
Urbo, Lando Lando: Madrido, Hispanio

Vi trovos ĝin rekte en la paĝo: https://edukado.net/kursejo?kid=27285

Nomo: Senpaga baza kurso de Esperanto
Gvidantonomo: Ruben Sanchez
Tipo: Nova movada kurso (necerta ĉu surloka aŭ reta, aŭ ambaŭ).
Urbo kaj lando: Nqn Cap, Argentino
Aldoninto: rubensanchez

Vi trovos ĝin rekte en la paĝo: https://edukado.net/kursejo?kid=27286

Pliaj universitataj kursoj: el UAM en Pollando (Poznan) kaj la Universitato Azim Premĵi en Bengaluru, Barato.

========= vortoj: 800 =========

Ĉi tiu komuniko estas disponebla laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite Samkondiĉe 4.0 Tutmonde.
Por pli da informoj vidu ĉe: <https://creativecommons.org/licenses/by-sa/4.0/>.

Aperintaj komunikoj legeblaj kaj elŝuteblaj ĉe: http://aktivulo.net/eo/content/komunikoj-pri-agado. La prezento estas ĝisdata ĝisla fino de 2020. Vidu ilin laŭjare, kun klaraj enhavaj indikoj por ĉiu jaro.

ALDONU VIN: Skribu al <stefan.macgill<ĉe>gmail.com>. Neniu alira kondiĉo aldone al valida retadreso. Malferma al Aligitaj Membroj, eksmembroj, neniam-membroj, klingonuloj, volapukistoj, atistoj, itistoj, ujistoj, iemuloj, Duolingintoj, ktp.

SUBTRAHU VIN: Skribu al la supra adreso. Donu vian nomon, retadreson, landon kaj (se eble) la grupon aŭ kialon por via ĉeesto en la ekspedolistoj.

Servo subtenata de Universala Esperanto-Asocio kaj Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj

ilei

Redaktoroj:
Stefan MacGill kaj Mirejo Grosjean

ENHAVO

- Tago de Gepatra Lingvo - afiŝo
- Persa literaturo
- La Regionisto
- Biciklistoj pluas
- Kursoj – RA, ES